

Kulturaj Kajeroj

É. MAMÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1982 - 6

KULTURAJ KAJEROJ

1982 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Kulturaj aranĝoj 1983 de la Esperanto-Domo

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Vojaĝo tra Ĉinio per kaj por Esperanto M. Turin

Angulo de la legantoj

La utopia mondo de Komenio F. Boyet

Paĝo por la infanoj A. Chils-Mee

Per la vento al la poluso H. Röllinger

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

ESPERANTO - DOMO

Grésillon, 49150 BAUGE (FRANCIO)

Tel : (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1983

PRINTEMPO

Internacia Renkonto de Infanoj

alveno Dimanĉon 3-an de Aprilo posttagmeze - foriro Sabaton 9-an de Aprilo posttagmeze

— kursoj, distraĵoj, diskutrondoj pri lingvo-instruado

SOMERO

PRELEGOJ kaj KURSOJ

alveno Sabaton 2-an de Julio - foriro Vendredon 22-an de Julio

— prelegoj diverstemaj
— kursoj diversnivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj
— malkovro de la regiono

DUA LOJRA ESPERANTO-RENDEVUO (23/24 JULIO)

organizita de L.F. KOOP

alveno Vendredon 22-an de Julio - foriro Lundon 25-an de Julio

— studgrupoj por progresantoj, perfektiĝantoj kaj fluaj parolantoj

KURSOJ

alveno Lundon 25-an de Julio - foriro Dimanĉon 7-an de Aŭgusto

— kursoj trinivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj - artlaboroj
— malkovro de la regiono

ARTMETIOJ kaj ESPERANTO

alveno Lundon 8-an de Aŭgusto - foriro Dimanĉon 21-an de Aŭgusto

— fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonlaborado... gvidataj nur en Esperanto
— vizito de la regiono kaj de artmetiistoj

RENKONTO de BLINDULOJ (organizita de FUBE)

ankaŭ malfermita al vidpovaj gesamideanoj

alveno Lundo 22-an de Aŭgusto - foriro Sabaton 3-an de Septembro

— prelegoj, kursoj, distraĵoj

Esperanto tra la Mondo

Jam prepariĝas la renkontoj de 1983...

— 68a universala kongreso de Esperanto, en Budapeŝto, de la 30a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto.

— Kongreso de la gejunuloj (TEJO), en Debrecen (Hungario), de la 23a ĝis la 29a de Julio.

— 56a kongreso de S.A.T., en Linz (Aŭstrio), de la 30a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto.

— Nacia franca kongreso de U.F.E., en Romans, de la 1a ĝis la 5a de Aprilo.

— Kongreso de SAT-Amikaro, dum Pasko, en Saint-Brieuc.

— Fervojista internacia kongreso, en Ostende (Belgio), de la 4a ĝis la 10a de Junio.

— Internacia Konferenco de la edukistoj (ILEI), en Sintra (Portugalio), de la 14a ĝis la 22a de Julio (kun ekskursoj al Coimbra, Lisbono, Fatima). Informas : A.F. Simoes, Rua Dr João Couto, R/CA P-1500 Lisboa.

— Internacia Esperanto-Semajno, en Cannes, ĉe la Lazura Marbordo, kun pluraj ekskursoj (de la 25a de Junio ĝis la 2a de Julio). Adreso : Internacia Esp.-Semajno, « Les Hortensias 2 », Domaine des Fleurs, 121 bis, boulevard Napoléon-III, 06200 Nice.

— Internacia Medicina Esperanto-Konferenco, en Proprad (Slovakio), de la 25a ĝis la 29a de Julio.

— 3a Internacia Literatura Forumo : « La Esperanto-kanzono », en Ĝenevo (Svisujo), de la 1a ĝis la 4a de Aprilo.

— Karuselvojaĝoj 1983 : Startoj de Bruselo la 13an de Majo, la 26an de Aŭgusto, kaj poste ĉiun duan vendredon kun reveno ĉiun duan mardon. Travojaĝo tra pluraj eŭropaj landoj (ĝis Pollando). Informas Eŭropa Esperanto-Centro, Monda turismo, Monfoyertr. 37/b. 24, B-1040 Bruselo.

— Esperanto-uzado en kongreso de Kibernetiko, en Namur (Belgio), de la 23a ĝis la 28a de Aŭgusto (kvar temoj). Adreso : Instituto de Kibernetiko, Prof. H. Frank, Kleinenbergerweg 16B, D-4790 Paderborn (F.R. Germanujo).

Kursoj en Universitatoj

Oni lasttempe anoncis malfermon de Esperanto-kursoj en la usona universitato de Provo (Utah), en la universitato Ekpoma, en la urbo Ileh (Nigerio), en la scienca universitato « Kossuth Lajos » de Debrecen (Hungario), en la ĉinaj universitatoj de Jishou (Hunan) kaj de Yunnan.

Krome, en la universitato de Paderborn (Germanio), en fako literaturo kaj lingvoscienco, D-rino A. Sakaguchi gvidas seminarion pri interlingvistikaj studoj kun Esperanto-kurso.

Inter lingvistoj

— En la jarkunveno de Modernlingva Asocio de Usono, kiu okazis de la 27a ĝis la 30a de Decembro 1982, en Los Angeles, estis sesio sub la titolo : « Esperanto kiel enkonduko al lingvostudado ».

— Kunlaboranto de la lingvoscienca Instituto de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio, Prof. Sergej Kuznecov, publikigis ruslingvan libron « Fundamentoj de interlingvistiko » kiu amplekse traktas pri Volapuko kaj Esperanto.

— Okaze de la 13a Internacia Kongreso de Lingvistoj kiu okazis lastan someron en Tokio, Japana Esperanto-Instituto aranĝis kunvenon kun tri esperantistaj lingvistoj, kun traduka sistemo. La prelegantoj estis D-ro Helmar Frank, D-ro Probal Daŝgupto kaj D-ro Dan Maxwell. Ili parolis pri fakaj temoj.

Esperantlingva konferenco pri naturprotektado en Estonio

Tiu konferenco okazis en la ĉefurbo Tallinn, la 23an de Majo. Inter la prelegantoj estis S-ro F. Eĩsen, eksministro.

En tiu lando, dum lasta somero, 80 junaj esperantistoj partoprenis 5-tagan renkontiĝon, kies kostojn kovris sindikata organizajo.

Esperanto en kibernetika fakrevuo

La germana kvaronjara revuo GrKG/Humankybernetik, eldonita ĉe Gunter Narr Verlag, PF 2567, D-7400 Tübingen, enhavas de nun artikolojn en germana, franca, angla lingvo kaj en Esperanto. Ebleco de subvencio por parte pagi la abonon pere de Instituto pri Kibernetiko ; Kleinenberger weg 16B, D-4790 Paderborn (por la individuaj abonemuloj).

Ĉe la mondaj federalistoj

Unu el la organizoj por monda federalismo, la « Provizora Monda Parlamento », dum kunveno internacia en Brighton, de la 4a ĝis la 17a de Septembro, decidis ke la internacia lingvo estos adoptita kiel eksperimenta laborlingvo ekde la jaro 1985.

Ĉe medicinistoj

Bone progresis la medicinista esperantista movado en Bulgario, kie funkcias 8 medicinistaj societoj kun 300 membroj.

En Orienta Germanio (G.D.R.) komenciĝis la terminologia agado inter medicinistoj. Eĉ pretiĝas ankaŭ veterinara fakvortaro.

Fondiĝis internacia fako por dentistoj, sine de UMEA.

Tago de la esperanta kulturo en Bulgario

Refondiĝis en Sofio la Bulgara Esperantista Kulturcentro Maxim Gorki. La centro aranĝis dum lasta Junio « Tagoin de la esperantista kulturo » al kiu venis pli ol 1.100 geesperantistoj por ekskursoj kaj artaj vesperoj.

Konkurso por skoltoj okaze de ĵamboreo en Kanado

Skolta Esperantista Ligo (S.E.L.) proponas sumon de 200 kanadaj dolaroj por 25 skoltoj, kiuj bone kapablas paroli Esperanton, kiam ili atingos la mondan ĵamboreon en Julio 1983, en la kanada provincio Alberta. Adreso de SEL : 45, 10th Ave., Roxboro, Que. Kanado (H8Y2N3). Oni scias ke Baden-Powell, la fondinto de la skolta movado, firme rekomendis al ĉiuj skoltoj lerni Esperanton.

VOJAĜO tra ĈINIO PER kaj POR ESPERANTO

La iniciaton de la vojaĝo havis Nancie Durham el Londono. Antaŭ 3 jaroj ŝi faris turisman rondiron tra Ĉinio kun la edzo. Je tiu momento ŝi komencis paroli esperanton. Renkontinte esperantistojn en Ĉinio kaj parolinte kelkajn vortojn kun ili, tial ŝi komprenis la valoron de nia internacia lingvo. Ŝi ellernis la lingvon kaj klopodis realigi intencon : vojaĝon tra Ĉinio nur per Esperanto ! Kiam la projekto ŝajnis realigebla ŝi anoncis ĝin al grupoj kaj gazetoj.

Malgranda informo aperis sur « Kulturaj Kajeroj » post la somero 1981a. Persone mi estis tuj kaptita de tiu anonco, kiu memorigis al mi la deziron de mia edzo, Gaston Turin, ek de 1978 : viziti Ĉinion ! Mi tuj informis pri tiu anonco novan amikinon, kiu ĵus revenis kun mi el Brazilio. Baldaŭ ni ambaŭ enskribiĝis, kaj dum la sekvantaj monatoj ni ricevis pli kaj pli da detaloj pri la vojaĝo : ĝi okazos de la 15a de aŭgusto ĝis la 4a de septembro ; foriro el Londono ; ĉefaj haltejoj : Pekino, Ksian (Xian) Chengdu, Suzhu, Shanghai ; reiro al Eŭropo el Hong-Kong.

La grupo enhavis 21 personojn el 5 naciecoj : australia (2-paro) brita (11), dana (1), franca (4 virinoj -ĉu la virinoj estas pli kuraĝaj aŭ pli vojaĝemaj ol la viroj ?), nederlanda (3).

Tiu vojaĝo tra Ĉinio estis « Premiero ». Kiam en Pekino sin prezentis nia gvidisto, li atente klarigis, ke por la unua fojo li gvidos esperanto-grupon kaj esprimis la esperon plenumi bone tiun rolon !

Mi ne diros detale pri la turismaj aspektoj de nia vojaĝo. En Pekino (Beijing), tradicie oni montras al la turistoj la grandan placon Tian an Men, la imperiestran Palacon, la Somer-Palacon, la Ming-Tombejon, la Grandan Muron. Sed plie nia grupo estis dum vespero varme akceptita en la sidejo de « EL POPOLA ĈINIO » de multaj pekinaj esperantistoj kaj ĉiu eksterlandano ricevis donacon. Kaj dum la ekskurso al la Granda Muro (belega !) akompanis nin dudeko da esperantistoj, plej multe el Radio Pekino ; sur la Murego ili registris intervjuon de la reprezentantoj de la 5 naciecoj (por Francio parolis Andrée Amice el Tours). Tion oni povis aŭskulti (fakte ne tre bone !) la dimanĉon 19an de septembro en elsendo de Radio Pekino.

La dua vizitata urbo estas Xian, malnova ĉefurbo sub kelkaj imperiestroj ; oni vizitas multain tombejojn en la ĉirkaŭaĵo, la plej impona estas la fosaro de la tombejo de Qin-imperiestro, esplorata sub grandega halo parte malfermita al turistoj, kiuj emocie sin trovas antaŭ armeo da statuoj el argilo laŭnature grandaj (6000 !). Sed por la esperant-vojaĝantoj la plej bela memorbildo restos la promenado en la urbo apud la malnova pagodo, kun multaj samideanoj, kiuj por la unua fojo emocie parolis al eksterlandanoj ! Multaj apenaŭ povis ordigi frazojn ; al multaj komencantoj ni donis kvazaŭ lecionon. Mi aparte memoros pri tiu suna mateno, dum kiu ni pli multe donis ol ni ricevis !

Poste ni vojaĝis aviadile ĝis Cheng Du, la plej okcidenta haltejo. En ĝi estas bona esperanto-grupo, kiu rilatas kun la grupo de Montpellier ; kiam mi anoncis, ke mi bone konas S-anon Lentaigne, mi estis tute aparte bone akceptita. Sed multaj gejunuloj, precipe viglaj petolaj fraŭlinoj ne scipovas esperanton kaj denove ni devis instrui la lingvon al ili, vespere promenante sur la granda avenuo, kiu kondukas al granda statuo de Mao. En Chengdu, ni pilgrimis al loko, kie vivis dum la 8a jarcento la fama poeto Du Fu. Muzeon oni starigis omaĝe al li ; en iu salono oni povas admiri belajn pentraĵojn inspiritajn de temoj de la poezioj ; mi fotis nian gvidiston, dum li legas esperantan tradukon antaŭ la responda pentraĵo, ĉar mi alte taksis tiun omaĝon !

Denove aviadila vojaĝo super Ĉinio kondukis nin al Nankino pentrinda laŭ mi pro la belegaj arboj de la urbo kaj ĉirkaŭaĵo, fama pro la granda ponto trans Jang Tse, kiun oni konstruis inter 1960 kaj 1968. En tiu urbo en bela salono de la hotelo, ni kunvenis ne nur kun esperantistoj de la urbo, sed kun samideanoj de la proksima urbo Jangzu, kiun ni vizitis la morgauan tagon, sub gvidado de bona esperantisto. Ankoraŭ dum tiu kunveno, ni admiris la fervoron de ĉiuj gejunuloj por la internacia lingvo ! El inter ili, regalis nin juna instruistino, kiu kantis bele « Tintsonoras Fonto » (gi aperis sur speciala numero de « El Popola Ĉinio » : 5 - 80, p. 42-43).

Belan memoron ni konservos pri la transirado per pramo sub matena suno de la Jang Tse riverego al stacidomo, kie ni envagoniĝis por Suzhu, silkurbo. Tie akceptadis nin esperantistoj ; emocie nia konstanta gvidisto retrovis sian maljunan esperanto-instruiston, kiu ĝuste prezidis la kunvenon, pli precize la distran vesperon pretigitan dum longaj monatoj de la gejunuloj por nia grupo ! sed ni ankoraŭ foje spertis, ke fakte tre malmultaj kapablas paroli, kaj same kiel en Xian, Chengdu kaj Jangzhu, ĉiu el ni klopodis paroligi ilin.

Kaj finfine ni alvenis en Shanghai. Inter la samideanoj tre lerta esperantistino akompanis nin dum niaj diversaj vizitoj al fabrikoj, laborista kvartalo, infanĝardeno, agrikultura komunumo, kun la helpo de nia konstanta gvidisto. La plej bela tago : la posttagmeza ŝipveturado sur la rivero Hangpu, kiu alfluas al la Jang Tse proksime al la maro. Sur la ŝipo ni kunvenis, babilis (inter la Ĉinoj estas korespondanto de J. Vincent). Kaj finfine, kiam alvenis la disiĝo — kiu ĉagrenis ĉiujn — granda espero dolĉigis la adiaŭon : la Shanghai-esperantistoj, ĝis nun ne organizitaj, tuj fondos asocion oficiale — kaj nia gvidisto, nun nia amiko, donis la esperon, ke post kelkaj jaroj, okazos Universala Kongreso en ĈINIO !

— Jes, ĝis revido en Ĉinio, niaj ĉinaj amikoj !

M. TURIN.

ANGULO DE LA LEGANTOJ

De S-ro R. Watier

Dum la legado de nia somera Kulturkajero, mi ekvidis la inviton al legantoj esprimi sian vidpunkton pri iu aŭ alia temo. Tuj mi diros mian intencon nek kritiki nek polemiki, simple alporti mian teknikan sperton de maljuna inĝeniero pri provizo de akvo por la kastelo, ĉefe pri la akvumado de la ĝardeno dum somero.

Laŭ mia scio, ekzistas du instalaĵoj jam tre malnovaj. La unua estas la puto kun ĝia pumpilo por propraj bezonoj de la kastelo ; la dua estas la hidraŭlika puŝmaŝino kiu pumpas el la rivereto por suprenplenigi specialan akvujon de kiu malsupreniras la tubaro al kranoj de la legomĝardeno. Jen, tiu lasta akvujo kiu difektiĝis de forfluoj laŭdire neripareblaj. Unue, mi volus esprimi ke, laŭ sperto de terkulturisto, akvo de rivereto estas tre valora por akvumi plantojn, pli bona ol tiu de subtera fonto aŭ de urba instalaĵo, kaj ke, dank'al tiu malnova sed bonkvalita hidraŭlik-maŝino, la suprenlevo de la akvo kostas nenio.

Do, estas tute bedaŭrinde se oni ne povas ripari la difektiĝon de la ujo. Ĉu vere oni konsultis lertan masoniston pri la riparo ? Tamen, se la difektiĝo ne estas riparebla, kial oni ne konstruus alian akvujon apud la malnova ? Tio kostus tamen malpli ol la branĉiĝo sur la komununa akvoreto.

Tiun konsilon mi volas kompletigi per mia sperto de posedanto de domo ĉe la kamparo en la departemento Eure-et-Loir. Antaŭ multaj jaroj, la akvo de la komunumo estis liverita al mi de la tiea loka kampara administracio, la akvo kostis malmulte. Poste, oni transdonis la akvozorgadon al konata tutlanda societo por provizo de akvo : rezulte, la akvo nun kostas multe pli ! Tial, mi afable esprimas al nia bona konsilantaro ke, se eble, ni konservu nian independantecon rilate al provizo de akvo.

La utopia mondo de Komenio

(Jan Amos Komensky 1592 - 1670)

Post la fama verko de Tomaso Moro, kiu nomis perfektan mondon « Utopio » (neniea), oni kutimas uzi tiun vorton kun la sama signifo, kaj multai homoj verkis pri utopiaj landoj, inter kiuj estis Kampanela (Campanella) en la tempo de Komenio, kaj pli proksime al ni, en Esperanto : « Vojaĝo al Kazohinio ». Sed Komenio tute ne verkis utopion, li verkis pri pedagogio, pri organizo de la klasoj, pri instruo de lingvoj, kaj projektis verki pri reformo de la mondo. Li ne deziris montri modelon al la homoj, sed reale konduki ilin al la estonta mondo, pri kiu li tre profunde kredis.

Resumo pri la vivo de Komenio

La infano naskiĝis, en 1592, en modesta familio, sed kiu aliĝis al la « Unuiĝo por la fratoj laŭ la leĝo de Kristo », protestanta sekto kiu posteulis la ĉekan reformiston Jan Hus. Li studis unue en la lernejoj de tiuj fratoj, poste en germana universitato, kie la instruistoj estis jarmilistoj kaj tre influis la junulon. Jarmilismo estas la substreko, en la kristanaj verkoj, de la partoj, kie oni asertas, ke Jesuo revenos kaj starigos regnon, kiu dum mil jaroj similos al la paradizo antaŭ la Adama peko. Nur post tiuj mil jaroj, okazos la lasta juĝo kaj la fino de la mondo.



Komenio fariĝis pastoro kaj instruisto en Fulnek, en 1618, jaro de la komenco de la tridekjara milito. Post la malvenko (por la ĉekoj) ĉe la Blanka Monto, la katolikoj deziris « reordigi » la landon, kaj tial ili bruligis la vilaĝon Fulnek ; ĉiuj havaĵoj de Komenio estis detruitaj kaj lia edzino kaj infanoj mortis pro pesto.

Post jaroj de vagado, li instaliĝis en Leŝno, kie li estis liceestro. Li jam reedziĝis kaj tradukis en ĉekan lingvon iun profetaĵon, kiu anoncis la finan venkon de la ĉekoj. Tiam li famiĝis pro la publikado, en latina lingvo, de libro pri instruo de la lingvoj ; kaj samtempe li verkis, ĉeke libroj pri pedagogio kaj speciale pri tre junaj infanoj.

Oni vokis lin de Londono, en 1641, por organizi la instruon, sed politikaj cirkonstancoj estis malfavoraj, kaj fine li laboris por la svedoj, pri pedagogio, kompreneble.

En 1648, le traktatoj de Vestfalio ruinigis la esperojn de la ĉekoj. Post morto de sia dua edzino, Komenio, kiu respondecis pri kvin orfoj, malsaniĝis (li estis 56-jara). Sed ekde 1649, la sama homo reedziĝis triafoje, kaj foriris al Hungario por organizi la pedagogian sistemon. Post trijara restado, li revenis al Leŝno, fariĝis episkopo ... sed baldaŭ la tiea suvereno decidis forpeli la protestantajn ĉekojn, kaj denove Komenio perdis ĉiujn siajn havaĵojn kaj devis fuĝi al Nederlando. Li estis tiam 64-jara, kaj decidis reverki, en la latina lingvo, ĉion, kion li jam verkis pri pedagogio (1657). Li preparis planon pri reformo de la mondo, kaj en 1665, li skribis leteron al la juna reĝo de Franclando, Ludoviko la 14-a, por proponi kunvenon de ĉiuj ŝtatestroj de Eŭropo, por strarigi pacon inter la homoj.

Tiu vivo montras batalanton, kiu spite al la kontraŭaj batoj, ĉiam elektis la esperon, ĉiam fidis pri sia patrolando kaj sia religio.

La kredoj de Komenio

Tia optimismo devas fonti el profundaj kredoj ; fakte tiuj kredoj estas ĉefe religiaj, kaj se oni trovas argumentojn, kiuj estas tradiciaj kaj mezepokaj (en la 17-a jarcento), tion oni povas klarigi per la kongruo kun la religiaj kredoj.

La homo estas bildo de Dio, kiu kreis ĝin : « por ke Dio ĝoju vidante sian bildon, por ke la aliaj kreitaĵoj obeu al la homo, por ke la homo estu mastro sendependa, tio estas sciu regi sin mem ». (2-a ĉapitro de « Pampedio »).

El tiu fundamento venas la kredo : « ĉiuj homoj egale edukeblaj » (kaj Komenio asertas, ke li instruos **ĉion** al **ĉiuj**), kaj ke : « infano sepjara kapablus respondi precize pri ĉiuj filozofiaj problemoj » (kvina ĉapitro de la « Granda Didaktiko »), kaj la religia kredo akceptas la grekdevenajn tradiciajn kredojn pri la kvar humoroj same kiel la popolajn kredoin pri la transdono, dum gravedo de la moralai kvalitoj disde la patrino al la infano.

Pri la fizika mondo, Komenio donas tri fontojn al la kono, kiuj estas : la sensoj, la racio kaj la religia revelacio. Kelkfoje tiuj fontoj kondukas al kontraŭaj konkludoj, sed Komenio elektas laŭ sia religia kredo, iam por la sensoj, alifoje por la racio aŭ la revelacio. Ekzemple, li rifuzas la katolikan transsubstancigon nome de la racio, sed li akceptas la teorion pri mikrokosmo, laŭ kiu oni povas klarigi la mondon (makrokosmon) per la homa korpo (mikrokosmo) kaj reciproke. Same li tute ignoras la eksperimentan sciencon, kiu tamen elvolviĝis de multaj jaroj, kaj 115 jarojn post Koperniko, 62 jarojn post Keplero, kaj 50 jarojn post Galileo, li asertas, ke la tero estas senmova meze de la mondo, kaj li sekvas Aristotelon apartigante la sublunan mondon, kie ĉio ŝanĝiĝas, de la supra ĉielo, tiel senmova kaj perfekte kvieta kiel estas Dio.

Pli ĝenerale, pri filozofio, li ripetas la tezojn de Aristotelo, sed tamen, post uzado de la teorioj pri formo

kaj substanco, kaj pri la fina kaŭzo, post sama klarigo de analizo, sintezo kaj komparo, li trankvile anoncas, ke la lumo ne estas en Ateno, sed en Jerusalemo, kaj ke oni devas malpermesi ĉiujn paganajn librojn. La argumentoj de Komenio tre ofte similas al paraboloj, li diras, ke li uzas komparon, sed fakte temas pri tre suprajaj analogioj, kiuj pruvas nenion. Ekzemple oni dresas bestojn kontraŭ ilia naturo (en la cirkoj), **do**, ĉar instruado estas laŭnatura ĉe homo (bildo de Dio), oni povas instrui ĉion naturan al ĉiuj homoj. Alia ekzemplo : oni semas la grajnojn en printempo, infanaĝo estas la printempo de la vivo, **do** oni devas instrui homojn en la infanaĝo.

La utopia pedagogio de Komenio

Inter la diversaj verkoj de Komenio, la plej fama estas la « Granda didaktiko », kiu aperis en la latina lingvo en 1657, sed fakte, ĝi respegulis ĉiujn liajn kredojn dum la jaroj kiam li praktikis mem la edukadon, kaj kiam li provis organizi la instruan sistemon en Svedio kaj Hungario. Eble pro tio, la teksto ne estas tre homogena. Ie oni asertas, ke la vero estas tia, ĉar tio estas la volo de Dio, sed aliloke, oni renkontas la sperton de la praktikinto, kiu ne tiel optimismas.

La verko estas prezentita kiel apriora, kaj en la komenco, Komenio diras, ke dum la aliaj raportas pri pedagogiaj spertoj, li prezentos sistemon, kiu estas antaŭ la sperto, ĉar ĝi fontas el la plej evidentaj reguloj, kiuj estas la sekvaj :

— La celo de edukado estas la savo de la homaro (antaŭ la lasta juĝo).

— Oni devas instrui la homojn, kiam ili estas infanoj (pro la printempa teorio).

— Oni devas instrui ĉiujn homojn (ĉar ĉiuj estas bildo de Dio).

— La instruo devas veni de la instruisto (kiu situas antaŭ iuj lernantoj, kiel la suno estas antaŭ ĉiuj homoj).

Post tiuj principoj, aprioraj, deduktitaj de naturaj (aŭ Diaj) veroj, evidentaj por Komenio, venas la proponitaj rimedoj :

— Oni lernas unue per la sensoj. Tiu tezo pri la fontoj de la kono aperas en la verkaro de Komenio, kiu publikigis libron, kies titolo estas « la mondo de la sentumoj bildigita ». Tiu verko utilas por la lernado de la unua lingvo, ĉar la aŭtoro opinias, ke oni ne povas lerni nomon sen antaŭa vido de la objekto. Kaj fakte tiu libro similas al la modernaj libroj por lernado de lingvo laŭ rekta metodo, kaj al diversaj bild-vortaroj. Sed por Komenio tiu kono per la sensoj, estas nur la unua paŝo, li kredas, sekvante Aristotelon, ke la vera kono fontas el la racio, kaj enhavas, por ĉiu aĵo, la kielojn kaj la kialojn, kiuj lokas ĝin en la monda sistemo.

— Oni devas instrui la regulojn nur post studo de kelkaj ekzemploj, kie kuŝas tiuj reguloj. Tiu principo, tre moderna, fontas el la kredo laŭ kiu « la racio korektas la sentumajn informojn ». Logike, tiu principo devus konduki al la eksperimenta metodo... sed oni tute ne povas trovi aludon pri tiu metodo en la verko de Komenio. Verŝajne ĉar por la aŭtoro, super la racio, kiu analizas, kaj komparas, estas la revelacio, per kiu Dio rekte instruas la homojn.

— Oni devas instrui per ununura libro, kaj la aŭtoro detale klarigas la enhavon de ĉiuj libroj, po unu libro por ĉiu klaso.

— La instruisto instruas al multaj infanoj, kiuj sidas en sama ĉambro. La aŭtoro klarigas, ke tiel oni multe pli rapide instruas. Sed, kompreneble, la instruisto ne povas ĉion kontroli, tial estas helpantoj, elektitaj lernantoj, kiuj kontrolas la laboron de siaj kamaradoj, instigas ilin al laboro kaj informas la instruiston pri la mankoj de iu aŭ alia.

— Laŭ la principo : oni iru de la plej facila al la plej malfacila studo, Komenio proponis la lernadon de la latina lingvo per traduko el la gepatra lingvo. En tiu tempo, tiu propono ŝajnis revolucia, kaj tial oni povas klarigi la grandan famon de Komenio. Sed tio estas facile komprenebla : Komenio estas ĉeko, li batalas favore al la ĉeka lingvo kontraŭ la germana, tial li proponas, ke en la unua lernejo oni instruu la gepatran lingvon, tio estas la ĉeka por Komenio, kaj nur poste, en la tiel nomata « latina lernejo », oni lernu la novan lingvon pere de la unue lernita. Tiel, li valorigis la gepatrajn lingvojn en la tempo kiam la protestantoj inaŭguris la kristanan liturgion en la nacia lingvo dum la katolikoj defendis la latinan, ĝis la Koncilio de 1963.

— Alia grava principo inter la rimedoj estas la iompost-ioma liberigo de la lernanto. Komenio, kontraŭe de Ruso' ne proponas, ke la juna infano estu libera. Tiu infano ne nur estas rigore protektata de la gepatroj kaj de la instruisto kontraŭ la mondo (kaj la scivolemo), sed oni invitas ĝin kopii la laborojn de la aliaj. Oni povas rimarki, ke tiu metodo estis tiu de la pentristoj de la Renesanco, kiuj unue kopiis antaŭ ol verki laŭ propra inspiro. Same estas por Komenio, kiu emfazas pri graveco de la memoro kaj ripetado en la unuaj jaroj de la lernado, sed poste, en liceo, la lernantoj studos mem pere de « misioj », kiujn oni donas al ili. (Pansofia lernejo).

Pri la celoj de tiu instruado-edukado, la asertoj de Komenio estas tre kontraŭdiraj. En la komenco de la verko li asertas, ke oni povas instrui ĉion al ĉiuj kaj ke ĉiu sepjara infano povas filozofii. Tio estas la principoj. Alia principo, kiu estas ankoraŭ tre nuna estas alkutimiĝi al la **bezono** intelekte koni la aĵojn. Alivorte, la edukita juna homo bezonas koni ne supraĵe, sed racie, la mondon. Tio estas nuna celo de edukado, sed ĉu ĝi estas atingebla ? Al tiuj noblaj celoj, en la principoj, necesas bedaŭrinde aldoni aliajn detale priskribitajn celojn, kiuj respegulas la mezan opinion de tiu tempo, kaj kiuj, krome, estas pli realistaj.

— Komenio opinias, ke la « ordo » estas la ĉefa rimedo en instruado (li komparas la lernejon al horloĝo), kaj pro tio la disciplino devas esti rigora.

— Komenio, post citado de Sankta Paŭlo kaj aliaj, konkludas : « mi dezirus, ke la instruo donita al la virinoj konduku ilin al honesteco kaj feliĉo, sed ne al sciivolemo. Necesas doni al ili neprajn konojn por bone administri la bienon, akiri sian savon kaj tiun de la tuta familio ». Tio tre similas al la deziroj esprimitaj en la teatraĵo de Moliero, kiu primokas la « sciantajn virinojn », kaj kie la edzo petas ke oni ne zorgu pri astronomio, sed pri kuirarto.

— Pri la lernantoj, kiuj ne sukcesas, kiuj teorie ne devus ekzisti, oni trovas diversajn asertojn kontraŭdirajn de Komenio. Inter tiuj mi citos :

- Necesas ne malesperi plibonigi almenaŭ unu el ili.
- Eĉ se ili ne progresos en la studoj, tamen ili akiros pli mildajn manierojn ; ili kapablos obei al la juĝistoj kaj al la pastroj de la eklezio.
- La punita infano akceptos la punon, kiel la malsanulo akceptas kuracilon.
- Eble, ankoraŭ hodiaŭ, oni trovas kelkain lernantojn... (kiuj) nur per batoj estas plibonigeblaj. Eĉ se tiuj severaj punoj ne agas sur tiuj, kiuj ilin ricevas, tamen ili inspiros al la aliaj savigan timon.

Post tiuj citaĵoj, oni povas konkludi, ke ekzistas granda diferenco inter la principoj, kiuj fontas el la « lumo de Dio », kaj la realaĵoj, kiujn renkontis Komenio en la lernejoj, kie li instruis, kaj en la edukaj sistemoj, kiujn li provis organizi en Svedio kaj Hungario.

La « universala konsultado pri reformo de la homaj aferoj »

Dun sia tuta vivo, Komenio verkis por instigi la homojn al nova sintenado, al reformo, verŝajne laŭ siaj kredoj, por prepari la miljaran regnon de Kristo sur la tero. Tial li redaktis diversajn verkojn inter kiuj kelkaj estis publikigitaj, la aliaj ne. Post la morto de Komenio, la manuskriptoj perdiĝis. Oni retrovis ilin nur en 1934,

ĝuste kiam Hitlero anoncis miljaran regnon (de la naziistoj, kaj ne de Kristo) kaj ili estis publikigitaj, fare de la ĉekoj, nur post la milito, en 1948 en ĉeka lingvo, kaj en 1966 en latina traduko. Tiu kompleta verko, kvankam trijarcenta, tamen estas do tute freŝa post longa dormado.

Laŭ la titoloj de la diversaj verkoj, oni tuj konstatas, ke Komenio sin turnis al la tuttera homaro, ĉar ĉiuj verkoj entenas la grekan prefikson « pan », kiun oni povas traduki en ia lingvo per « universala ». Oni ne devas forgesi, ke por Komenio, la tero estas la centro de Universo. Same oni ne devas forgesi, laŭ Komenio, ke temas pri realigo de la Kristaj promesoj, tial la kristanoj estas unue celitaj, kaj ili devas, laŭ Komenio, veki la tutan homaron kaj instrui la Kristan veron. La ĝenerala plano de tiu grandioza verko estas tiel resumebla. Estas sep universalaj paŝoj, kiuj estas respektive :

veko (alvoko al homoj) ; **lumo** (kiu prezentas al la homoj la universalan harmonion) ; poste la homoj kontemplos la solan Veron ; **saĝo** kiu nature kaj racie deduktiĝas el la lumo ; **edukado** kiu retroviĝas en la granda didaktiko ; **lingvo** kiu celas la normigon de la homaro ; **ordo** kiu montras la instituciojn de la mondo ; **admono** (alvoko al la ŝtatestroj, kiu memorigas pri la letero sendita al Ludoviko la 14-a).

El tiu grandega verko, kelkaj partoj estis publikigitaj en la vivo de Komenio. En 1656 oni presis anonime libroĵn pri la universala veko kaj la universala lumo. Ĉirkaŭ 1650, Komenio redaktis la libron : universala saĝo, kaj grandaj partoj de la universala eduko troviĝas en la didaktikaj verkoj publikigitaj en 1657. Jam en 1651, post laboro en Hungario li verkis pri « pansofia lerneio » (lerneio de la universala saĝo). Sed restis sekretaj, ĝis 1966, por la plej granda parto de la homaro, la projektoj pri la kreado de tutmondaj institucioj, kaj tiuj projektoj montras tre precize tion, kio estas utopio.

Unue la verko pri « universala ordo », **komenciĝas per teorio :**

— la reformo okazos antaŭ la fino de la mondo ;

— ĝi estos la verko de Kristo sed postulas apogon de la homoj ;

— ĝi devas naskiĝi en kristanismo ;

— la bono devas esti agrabla, kaj agi senperforte ;

— la sektoj devas malaperi. Kaj en tio oni trovas la ideon de la Moravaj Fratoj « por unuiĝo de la kristanoj » ; la aŭtoro skribas : « platonisto, stoikisto fariĝos filozofoj ; luterano, kalvinisto, katoliko estas kristanoj (sed li tute ne aludas pri aliaj religioj) kaj aŭstriano, hispano, franco fariĝos mondanoj» ;

— devas ekzisti nur unu doktrino, religio, proprieto por ĉiui bienoj (tiu komunismo troviĝas en la « Civito de la Suno » de Kampanela) ;

— ni ordonas, ke oni forigu la maldiligentecon, la mallaboremon, la scivolemon ; ĉiu nur plenumu sian devon.

Tiu teorio, tre rigora, permesas antaŭvidi la diktaturon, kiu fontus el tiu perfekta vero. Fakte Komenio montras unue, ke la registaro ne povas erari, kaj poste, ke oni devas blinde obei ĝin.

Laŭ Komenio, la krimoj, la timo kaj la malfido fontas el la konfuzo inter la povoj kaj li klarigas, ke estonte estos tri povoj sendependaj : la scio, la religio, la politiko. Sed fakte, ĉio estas subigita al la kredo. Ekzemple la kleruloj, kiuj respondecas pri la scio, ne devas serĉi en paganaj libroj, la politikistoj ne devas okupiĝi pri religio kaj reciproke (granda mezepoka problemo).

Komenio asertas, ke se ĝis nun la homoj estris laŭ sia propra intereso, post la reformo, ili estros laŭ la « ĝenerala Bono » : « ni devas reveni al la paradiza simpleco... forigi ĉiujn makiavelaĵojn por reveni al la leĝoj de la Naturo » ... « Ne plu estos militoj... ĉar ili ne ekzistis en la komenco de la mondo » ... « Tigroj kaj lupoj ne plu estos kruelaj bestoj, sed aliĝos al la Krista grego ».

Post tiaj profetaĵoj, Komenio profetas universalan lingvon sed sufiĉe malsimila de Esperanto. Kiel kutime, li unue teoriumas :

— la malsamaj lingvoj ne permesas konigi la veran Dion ;

— universala lingvo montros nian repaciĝon kun Dio ;

— Kristo promesis novajn lingvojn al la kredantoj ;

— je la fino de la mondo Babilono falos ; se la nova lingvo estas racia, harmonia, milda kaj **luma** ĝi agnoskiĝos ;

— oni devas sekvi la metodon de la paradizo : praktiki la aĵojn mem. Tiam la aĵoj sin proponos al la sensoj de la studanto, kiu povos nomi ilin nur per **ununura nomo** ; ĉar aĵoj estas koncepteblaj nur laŭ unu maniero, kaj sekve povas ricevi nur unu nomon.

Sekve de la apartigo de la tri povoj, Komenio antaŭvidas :

— Universalan luman konsilantaron (por klerigi).

— Universalan konsistorion (pri religiai aferoj).

— Universalan pacan tribunalon (pri politikaj problemoj). Sed antaŭ ol entuziasmiĝi pri tiu genia anticipo, necesas konscii, ke la kleruloj precipe luktas kontraŭ la homoj, kiuj pensas ne konforme al la « lumo », ke la presistoj devas ricevi permeson, kaj ke krome ekzistas cenzuro (ĉiu libro devas esti aprobita de la tri instituciojl). La konsistorio malpermesos ĉiujn herezojn, kaj Komenio skribas : « la konsistorio povos uzi la ĉiopovajn fulmojn pri kiuj parolas Sankta Paŭlo ». Kaj en tiu paradizo : « la riĉuloj studos, la malriĉuloj **raitos produkti,** kaj estos akceptataj nur la prezentaĵoj pri la « lumo de Dio ».

Skizo pri la mekanismo de tiu utopio

La utopia priskribo prezentiĝas kiel logika dedukto de unu principaro. En la sistemo de Komenio oni ofte trovas :

tio estas, **do** ni devas fari...

La principaro mem estas apriora,, tion klare diras Komenio mem en la unua ĉapitro de la granda didaktiko. Kaj tiui principoj fontas el kredo miksita, kie superas religia kredo.

En tiu kazo, la utopio prezentas estontaĵojn, tial ĝi ne bezonas lukti kontraŭ la sperto. La antaŭaj spertoj ne valoras, ĉar oni ŝanĝos ĉion, kaj pri la estontaĵoj ne estas sperto.

Tiu principaro estas profunda kredo de la aŭtoro, kiu ĉiam esperis, spite, kaj eventuale dank'al la estantaj kontraŭbatoj. « Se Dio tiel suferigas nin, tio pruvas, ke baldaŭ ĝi venos starigi la jarmilan pacon... tial ni devas prepari la mondon por ĝia veno ».

Pasis la jarcentoj, kio ŝanĝiĝis ?

F. BOYET.

La abontarifoj ŝanĝiĝas ekde la 1-a de Januaro 1983.

Bonvolu rigardi la liston de niaj perantoj.

PAĜO POR LA INFANOJ

Karaj geknaboj de Kastelo Grezijono,
Ekde nun, unu paĝo en ĉiu numero de 'Kulturaj Kajeroj' estas por vi. Sur ĝi aperos tio, kio interesas vin.

S-ro Wre Chandler (rej ĉandle), aŭstralia amiko de Grésillon, skribos al vi pri la tre interesaj bestoj kaj plantoj de sia unika lando. Lia unua rakonto aperas sur ĉi tiu unua paĝo.

La poemon mi prenis el libro de s-ro Bertram Potts, nov-zelandano.

Ĉi tiujn legaĵojn mi, kiel redaktoro de via paĝo, mem elektis. Mi esperas, ke ili plaĉos al vi. Mi esperas ankaŭ, ke vi skribos al mi por diri, kio interesas vin, pri kio vi deziras legi sur via paĝo, kaj mi esperas ĉefe, ke vi sendos al mi kontribuojn — ŝercojn, enigmojn, desegnojn, poemojn, rakontojn... — por via paĝo.

Mi esperas multon, ĉu ne ? Kompreneble ! Mi estas esperantisto !

Amike via,
Audrey.

ENIGMOJ

— Ĉu vi povas el besto fari ilon por vidi longdistance ?
Skribu la nomon de la besto : PORKO

ŝanĝu unu literon kaj ĝi fariĝas manĝ lo :
ŝanĝu denove literon kaj ĝi fariĝas bakilo :
ŝanĝu denove literon kaj ĝi fariĝas vidilo LORNO

— Nun faru same por ŝanĝi vian kapon en ion manĝeblan !

1. KAPO
2. desegno de la mondo
3. korpo-parto
4. manĝaĵo

— Jen koda mesaĝo de mi al vi :

GFMJDBĴO LSJŜUOBŜLBĴO LBĴ ĴBSGJOBĴO GFSJPĴO !

Kiom da tempo vi bezonas por el-kod-igi ĝin ?

El la suda duono de la mondo

PROMENO EN LA MALLUMO

Venu kun mi promeni en la mallumo. Ni iru en la arbaron. Ne timu. En nia bela Aŭstralio, ne estas danĝeraj bestoj en la arbaro.

Ni prenu poŝlampon. Jen sonas delikata fajfado. Certe tio ne estas birdo. En la lumo de nia poŝlampo, ni vidas du verdajn okulojn.

Tiuj estas de eta rano.



Estas malfacile vidi la beston, ĉar lia koloro estas verda, same kiel la folioj. « Jen mi, jen mi ! » li ŝajnas diri. Li timas la lumon kaj forsaltas.

Per grandaj piedoj, li glis-flugas al proksima arbo, kaj malaperas inter la folioj.


Venontan fojon, ni parolos pri du pli grandaj, ruĝaj okuloj, kiujn ni vidas.

Ĝis !

Onklo Wre el Aŭstralio.

SE NUR MI ESTUS RUBEKOLO

Se nur mi estus rubekolo
mi flugus trans la maron ;
ne plaĉas al mi neĝtavolo —
mi irus Zanzibaron
aŭ landon eĉ pli malproksime,
por ĝui sunajn tagojn
kaj ne atendus vintron time,
sed manĝus frandajn fragojn !



Sur ĉiu branĉo beroj kreskas
sukplenaj, multkoloraj ;
papagoj ridas kaj burleskas
en arboj bonodoraj.
Senĉese birdoj kantas ĉarme
honore al somero —
la suno ĉiam brilas varme
je l'fino de la tero !

El : « Poezia Bukedo por geknaboj de la mondo » de Bertram Potts, Nov-Zelando.

PER LA VENTO AL LA POLUSO

sur la spuroj de la arktika balon-ekspedicio S. A. Andrée en 1897

Ankaŭ ĉi-jare, en 1982, dum la « Kultura Periodo » en Kastelo Grésillon, Hugo Röllinger prezentis serion da diapozitivaj prelegoj pri diversaj kulturhistoriaj temoj.

Pri unu el ili, unuafoje prezentita, la preleginto disponigis al ni ĉi-sekvontajn ekstraktojn.

I. — **Enkonduko**

Ĝuste nun, en 1982, la homaro apenaŭ konsciiĝas pri historia datreveno. Pasis precize 25 jaroj de kiam, la 24an de Februaro 1957, unuafoje en la historio de l'flugtrafiko, renkontiĝis du laŭplanaj pasaĝeraj aviadiloj rekte super la Norda Poluso. Je la 22,40 horo MET tiutage, la « Guttorm Viking » veninte al Kopenhago kaj la « Reidar Viking », veninte el Tokio, renkontiĝis je alteco de 5 000 metroj super la eterna glacio de la Arktiko. Per tiu-ĉi nova traf.ka linio, kiun sekvis diversaj aliaj interkontinentaj, estis kreata la plej mallonga kaj plej rapida interligo « Eŭropo — Azio ». La tempodaŭro de flugado inter Kopenhago kaj Tokio duoniĝis : nur 30 horoj.

Abundaj en la historio pri la esplorado de ni terglobo estas la riskoplenaj, danĝeraj kaj eĉ aventuraj ekspediciaj entreprenoj de l'homo, krei antaŭkondiĉojn por nia nuntempa moderna flugtrafiko inter kontinentoj. Pri unu el tiuj pioniraj ekspedicioj, eble la plej riska kaj kuraĝa el ĉiuj, jen temas.

II. — **Enhavo de la prelego**

Kuraĝigitaj de la eminentaj polusaj esploristoj Nansen kaj Nordenskjöold, kaj finance subtenitaj de Nobel, la 11an de Julio 1897 la svedaj sciencistoj S. L. Andrée, Knut Fraenkel kaj N. Strindberg startis en giganta aerostato (4800 m3) plenigita per eksplodiva h.drogeno direkte al la norda poluso, en epoko ankoraŭ senaviadila, sen telegrafa, senradio-teknika.


En 1930, norvegoj malkovris la sciencistojn, mortintajn ĉe ilia taglibro. T.am, usona gazeto tuj ofertis por primaraj presrajtoj pli da mono ol estis pagita, 4 jardekojn pli poste por la raportoj de la unuaj astronaŭtoj.

Post 65 horoj, spite de penaj klopodoj, la balono estis devigata surglaciiĝi. Distanco ĝi la poluso : 800 km. La tri viroj, en dezerto de sencele moviĝanta drivglaciaro, ekmarŝis returnen, direkte al firma tero. Distanco : 300 km.

Kiel kaj pro kio ili mortis ? Por solvi ankaŭ ĉi-tiun enigmon pasis pluaj 20 jaroj post la malkovro de la morta tendumejo.

III. — **La malkovro de la morta tendumejo en 1930**

En la arktika somero de la jaro 1930, norvega ekspedicio elŝipiĝis de la foka ŝipo « Bratvaag » sur la dezertan insulon « Vito » en la polusa maro, oriente de Spicbergen por esplori sciencajn taskojn.



Ankaŭ fokaj ĉasistoj estis sur la ŝipo. Ili vagis unuope trans la insulo plen-kovrita dezerte per ŝtonaro kaj rokeroj. Inter morenoj, sin traŝovas fosaĵoj en sulkoj plenaj je neĝumita glacio.

Jen, subite, ekkrias ĉasisto, ĵetas alten siajn brakojn kaj ekkuras ekscitite returnen al la ŝipo. « Jus mi trovis ion eksterordinaran... » li raportas al la kapitano. La ŝipanaro tuj nervoze ekscitiĝis, la ĉasado ĉesis. Emocie kaj konsternite, la viroj staras antaŭ sensacia eltrovo : Jen, inter la rokoj, ili vidas la restojn de la ekspedicio de la sveda inĝeniero kaj sciencisto August Andrée, kiu, 33 jarojn antaŭe, en Julio 1897, estis startinta kun du kunuloj por atingi, pere de libera balono, la geografian nordan poluson, kaj kiu, de tiam, restis perdita, malaperinta...

Plena de entuziasmo, la tiama mondo, antaŭ 95 jaroj nun, estis sekvinta interesite tiun kuraĝan entreprenon. La lasta informo pri ĝi estis la terkolombo startigita de la 82a latitudo kun la mesaĝo : « En balono, ĉio en ordo ».

Dum plena generacio, la mondo estis cerbuminta pri la sorto de Andrée kaj liaj kamaradoj, Nils Strindberg kaj Knut Fraenkel. Neniu el la diversaj serĉaj ekspedicioj, dum 33 jaroj, estis trovinta iun ajn postsignon de la balonveturantoj. Ĉu ili falis en ventego frakase sur la glacion aŭ en la polusan maron ? Ĉu ili dronis, aŭ ĉu ili pereis pro frosto aŭ pro malsato ?

Kaj jen do nun la morta bivako de tiu ekspedicio ! La norvegoj prizorgis kaj enŝipigis la morto-restojn de la esploristoj, same ties glitveturilojn, fald-boatojn, multajn ekipaĵojn, sciencajn aero-naŭtikajn intrumentojn savitajn.

Savita ankaŭ estis la fotografia ekipaĵo kun serio da ekspozitaj rulfilmoj, kiujn oni sukcesis, per rafinitaj fototekn.kaj metodoj, parte riveli post plenaj 33 jaroj da ilia restado sub glaciaro kaj neĝo !

Kelkajn el la plej sukcesaj ni vidos ĉi-sekve ; ĉi-tiuj **unikaj bild-dokumentoj** estas senescepte nigraj - blankaj.

Krome, ne malpli rimarkinde, la norvegaj trovintoj tre delikate kaj singarde pritraktis la 3 taglibrojn de la aeronaŭtoj. Tuj montriĝis ke ili, kvankam grave lezitaj, enhavas tiel precizajn raportojn kaj geografiajn poziciajn notojn, ke estis eble rekonstrui pere de ili la mortan perbalonan veturadon en la arkitka glaciaro ĝis en ĉiuj detaloj. En detaloj ne nur aeronaŭtikaj kaj geografiaj, sed eĉ en tiaj pri la sentoj, pensoj kaj animstatoj de la tri viroj.

Tamen, la enigmo pri la efektiva kaŭzo de la morto de la esploristoj, la mistero pri la patologia esenca eco de la morto, dum jardekoj restis nesolvita.

Du el la sciencistoj evidente mortis ekstere de sia dormosako, sur natura dezerta ŝtonaro. Troviĝis sufiĉe da provizoj kaj da freŝa viando, troviĝis ĉirkaŭ la bivako la pafiloj kun tute sufiĉe da municio. Krom tio, la tri sledoj staris, pretaj, perfekte ŝarĝitaj, kvazaŭ antaŭ ekveturo...

Dana kuracisto, nun en nia epoko, solvis ĉi-tiujn misterojn. Koncize, ni nun rekonstruu, ekstrakte, la okazintaĵojn :

IV — Pri la balon-veturado de la 11a ĝis la 14a de Julio 1897

La balono ŝvebas en alteco de ĉirkaŭ 500 m., temperaturo, 6° C, animstato de la viroj, bona !. Nebulo envolvas la balonon, La maro sub la aglo estas kovrata per disa drivglacio bele azurblua.

La unuaj 4 el la entute 32 leter-kolomboj estas forsendataj. Ili neniam atingis sian celon ; nur unu el la 32 kolomboj povis plenumi sian komision.

La unuaj horoj certe efektive flugis por la « Agloviroj ». Ili mezuris, observis, registris kaj sendis mesaĝoin al la mondo. Unu el la naĝbuoj est s ĵetata : ĝi naĝe drivis 1142 tagojn, do pli ol 3 jaroj. Tiam la cetera mondo sciiĝis : « Nia vojaĝo ĝis nun bone sukcesis. Ni estas nun super la glacio. La vetero rava, la humoro bonega. Super la nuboj. Andrée, Strindberg, Fraenkel ».

Sed, baldaŭ, la tri viroj konstatas ke la sentemeco de la balono kontraŭ la ŝanĝemaj temperaturoj, kontraŭ nebuloj kaj nuboj ludos decidan rolon por la maniero de la veturado. Venontan tagon, ili venis en ombro de nubo, 4 minutojn poste la trenkabloj tuŝas la glacion : rapide la balono malaltiĝis kiam la varmigaj radioj de la suno ne tuŝas ĝin plu.

De nun ĉesis la « libera flugado ». Sed la veturado daŭris, ĝis la fino, multe pli malalte, inter 100 kaj 20 metroj. Tute proksime de ili, sube, faŭkas larĝaj fendoj en la drivglacio. Denove, valora balasto devas esti eljetata. La nebulo densiĝas ; videbleco maksimume 2 — 3 km ; ĉirkaŭronde, akvo kaj glacio... kaj tre malforta vento ! Tuj poste, eĉ ne bloveto da vento ! La balono staras, senmove, preskaŭ dum du plenaj horoj !

Tiam, kompleta ŝanĝiĝo de la meteorologia situacio : facila, zefira venteto el konstraŭa direkto, do el oriento, kiu blovis la balonon devie, rekte okcidenten ! Andrée solece sidas sur la tegmento de la gondolo observante kaj skribante...

17 horojn nun ili estas « flugantaj ». La unusolan manĝaĵon ili estis prenintaj hieraŭ, la tagon de la starto, vespere. Do nun ili meritas opulentan matenmanĝon. Post 18 minutoj la kafo estas preta helpe de la kuiraparato pendanta sub la gondolo. La kuirado en la balono estis ekstreme danĝera ĉar la balono ja estis plena de hidrogena gaso. Estus danĝero de eksplodo dum manipulado eĉ nur per fajrero. Pro tio, la kuiraparato, speciale konstruita, estis pendigita nur sube de la gondolo. La aparato funkciis per alkohola flamo kiun oni pov.s, per specialaj aranĝoj, bruligi kaj estingi restante en la gondolo. Per instalita spegula sistemo, oni eĉ povis kontroli ĉu brulas aŭ ne.

Dum la manĝado, pro humuro, Andrée ŝpareme lekas purige la feran najl-tirilon, per kiu li estis malferminta la kremujon.

Estas diafana nebulo, el kiu falas subtila pluveto. Alteco : 60 metroj. « Sub ni, glacio ruĝa pro sango », notis Strindberg, « Ĉu spuroj pri manĝaĵo de urso ? », li aldonis.

Tuj poste, la balono ekfalas tiom profunden ke la gondolo dufoje ekpuŝas sur la glacion. Minacas la danĝero ke la gondolo povus esti ĵetata detrue kontraŭ la glacio. Jen, senespere, ili eljetas la grandan buon destinitan por la poluso. Dolora decido !

Decido kiu, evidente, indikas dubon aŭ eĉ konvinkon, ke la kunuloj ne atingos la celon. Pli ol 2 jaroj poste, oni trovis la buon.

Sed, spite de ĉiuj balastaj oferoj, tuj poste la gondolo plurfoje kaj forte ekfrapas la glacion. Tro peze kaj preme ŝarĝas humida nebulo la aerostaton. Tragediaj horoj komenciĝas. Andrée, de nun, sen ripozo, observadas. Tra densa nebulo, la balono trenas la gondolon trans kompaktaj glaciaj blokoj. Kontraŭ ili, la gondolo ĉiam denove ekpuŝiĝas. La nebulo ne ĉesas, ja eĉ densiĝas. Nun, daŭre, nur post 1 — 2 minutoj, la gondolo « stampadas » la glacion. « Eĉ ne manĝi oni povas senĝene », konstatas Andrée. Fine, la balono, glitante super ĝia tuta surfaco, staras en la aero, ekstreme malalte, ŝanceliĝante en venteto, sed ne moviĝante. « Jen, Andrée skribas, dum li postene observas, povus esti venontaj al Grenlando, oferintaj pluan balaston, sed ni preferis resti senmovaj. Pro la senĉesa surpuŝiĝoj, ni hodiaŭ ne povis dormi, eĉ ne povis kuŝiĝi modeste kaj ni ne estus povintaj tion elteni pli longe. Ni nun bezonas ripozon. Certe, estas strange ŝvebi ĉi-tie, super la polusa maro. Ni do estas la unuaj... Kiam iu imitos nin ? Aŭ ĉu la homoj nin juĝos frenezaj ? ».

Intertempe, la mondo civilizita sopiris al informoj... Multe pli poste, ni ricevis respondon pri ĉiuj demandoj pere de la notaĵoj, kiuj konservis plej parte kaj fidele, tiom longe la glacio polusa.

Venontan tagon, 13an de Julio 1897

Dum la tuta nokto, la balono restis fiksita, trenkablo estis kaptiĝinta sub glacia bloko. De orienta vento ĝin fiksis. Sed, jen, post 13 horoj, la vento turniĝis je 180°, skuis puŝe la balonon sur la glacion kaj la balono estis libera... Sed la veturado, nun orienten, ne fariĝis pli feliĉa. Plurfoje ekpuŝiĝoj de la gondolo sur la glacion, daŭre... Ree io devas okazi por faciligi la flugadon ; diversaj ekipaĵoj, inter aliaj medicinkesto, estas ĵetataj. Sed, tamen, la saltetado de la gondolo super la bloka kaj ĝiba glacio ne ĉesas. La direkto estas nun pli norda, sed nur eta rapideco.

Ĉar Strindberg, pro la konstantaj ekpuŝiĝoj, fariĝis marmalsana, li kaj Fraenkel suprengrimpas en la portringon por observi kaj registri.

Estas la 20a horo de la 3a tago. La viroj decidas, en lasta espero, fari ĉion por altenigi « La Aglon », t.om ke ili povu funkciigi la velon.

Sube de nebulo, briletas glacio kaj akvo... La trian tagon, je la 22a horo, la gondolo denove, ree kaj ripete puŝiĝas grave sur la glacion. La nebulo tre densiĝis, do, sekve, la grandioza balona pilko ree plipeziĝis pro abunda humideco...

Jen la lastaj notaĵoj de Andrée pri la veturado de la balono : « 14-7-1897, je la 6,20a horo (4a tago), la balono altiĝis, sed ni malfermis ambaŭ ventilojn... Je la 8,11a horo ni elsaltis el la gondolo... ».

La aventura surglaciara remarŝado

La viroj nun estas en vera dezerto konsistanta nek el glacio, nek el akvo. Estas la plej danĝera tereno sur kiun homo povas meti sian piedon.

Du monatojn poste, la 15an de Septembro 1897, en terura penado, la viroj kamaradece sin estis turmentintaj trans glaciaj blokoj, tra maroakvaj fendoj, kun pezaj sledoj.


Sed, nun, pli kaj pli, la sezono necesigas travintradon. Nur mallonge ja daŭras la kvazaŭa arktika somero, pli kaj pli la vintro sin anoncas. La viroj estas konsciaj ke ili devas resti kie ili estas. La tri aviadistoj de « La Aglo » fariĝis kaptitaj de la glacio, kaptitaj dum plurmonata obskura arktika vintro. Kien ili drivos ?

La viroj decidas konstrui glacian kabanon. Pro tio, ili elkavigas glacian pecegon, kaj kompletigas fendojn, truojn kaj mankantajn flankaĵojn per neĝo kaj akvo, por ke la tuta neĝa-akva-masonaĵo firme glaciiĝu.

Estis la 15a de Septembro... Klara tago. Subite, dum la laborado, granda surprizo : preskaŭ samtempe, dum paŭzeto, niaj tri viroj ekvidis teron ! Unuafoje teron depost sia elmarŝado, je 10km for, ili taksas, la « Blanka Insulo » « Vito » la plej orienta insulo de la Spicbergeninsularo. Sed, la viroj eĉ ne riskis provon atingi la teron. Andrée desegnas la insulon.

Iom timiga estas por la viroj la konstato ke la interpuŝiĝantaj glaciaj blokoj ĉirkaŭ la pecego sur kiu ili drivas rodas kaj formordas konstante ĝian bordon. Ĉio moviĝas ĉirkaŭ la viroj, ĉiam, dum la tagnoktoj, estas konstanta natura tumultado, senĉese, de sub iliaj piedoj, ili sentas kraketadon, lo murmuras kaj plaŭdas, senĉese knaras kaj gluglas...

La glacia kabano estas finkonstruita. Strindberg eĉ desegnis ĝian planon. Notaĵo de la 28a de Septembro : « Hieraŭ vespere, ni enloĝiĝis kaj baptis nian kabanon « Hejme ». Unuafoje ni estas sub firma tegmento, kaj ni sentas nin vere agrable ».



« La Aglo » tuj post la surglaciiĝo, la 14an de Julio 1897.

Nu, estis urĝa tempo havi hejmon, almenaŭ el glacio : estis 10° C. sub nulo. Sed terura sorta bato abrupta ĉesigis ĉion. Andrée notis : « Subite, dumnokte, ni aŭdis tondran ekkrakon kaj bruegon, kaj jam ekfluis torento da akvo en nian kabanon balanciĝantan. Ni ĵetis nin ekstere, kaj jen : nia bela fortika glacia pecego estis disrompita en aron da pecoj, ĝuste laŭlonge de la kabana muro. Parto de la kabano pendis de ĝia tegmento anstataŭ ol porti ĝin. La kabano kaj la glaciara kampo ne povis nin protekti pluen... Neniu el ni perdis la kuraĝon. Kun tiaj kamaradoj, oni povas persisti, venu kio ajn ».

Sed ĉi-tiu evento de la 2a de Oktobro evidente ĉesigis ilian resisto-forton, ankaŭ psike. Tiam finiĝas la notaĵoj de ĉiuj tri. Nur Strndberg notis ankoraŭ dum kvin tagoj po unu lapidaran vorton. Pro tio, ni scias ke ili atingis la insulon « Vito » kaj surteriĝis kun ekipaĵoj dum neĝa ŝtormado. Tiam ankaŭ Strindberg silentas. Por la lasta fojo, la 17an de Oktobro li notis : « Hejmen je la 7.05 horo ».

Pri kiu « hejmen » li parolas, ni demandas nin ? Ĉu la viroj vagis serĉante eliron sur la insulo ? Aŭ ĉu ili eĉ riskis veturi per sia tolboato en la glaciumantan maron por atingi Spicbergen, kiu estas videbla de la insulo ? Ni ne scias...

Ni ankaŭ ne scias kiom longe ili ankoraŭ vivis. Pri la lastaj horoj, kuŝas la glacia silentado de la Arktiko.

Ŝajnas ke Strindberg mortis la unua, ĉar li estis entombigita en roko fendo, kovrita per ŝtonoj. Lian postlasaĵojn la kamaradoj aparte estis deponintaj : oran medalionon en formo de koro, kun foto kaj buklo de lia fianĉino.

La mortecaj restoj de liaj kamaradoj, 33 jarojn poste, en 1930, estis trovitaj interne de tendaj restoj, flank'je flanko, sur nuda tereno, kvankam la dormsako kuŝis tute proksime de ili. Kial ili ne estis ĝin uzintaj ? Ĉu la morto de ilia amiko ilin tiagrade ŝokis ke ankaŭ ili volis endormiĝi por neniam plu vekiĝi.

Apud ili troviĝis, depost 1897, tri fusiloj, municioj, foto-aparato kun filmoj en metala ujo, la boato kaj aliaj ĉiuspecaj ekipaĵoj...

Intertempe, la tekniko de flugado estis inventita. Aro da flugmaŝinoj eskortis la ŝipon portanta la ĉerkojn de la tri sciencistoj. En solena procesio, tiam, hejmeniĝis la tri naciaj herooj al sia hejmlando, Svedio. Kiel pioniroj, avangardistoj por nia moderna trafiko trans la poluso.

Hugo Röllinger.



La sledo de Fraenkel kun la boato
de dekstre, maldekstre : Andrée, Strindberg, Fraenkel.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	L	A	Ŝ	A	R	E	T	T	R	A	J	N
2	E	T	O	S	■	■	R	U	I	N	O	J
3	K	R	A	T	E	R	E	T	O	■	D	E
4	S	A	■	E	M	A	N	O	■	K	O	M
5	I	B	E	R	U	J	■	■	O	R	F	E
6	K	I	T	■	L	O	■	S	P	I	O	N
7	O	L	E	A	S	■	U	R	E	T	R	■
8	G	O	R	D	I	O	■	P	R	I	M	O
9	R	■	N	E	O	N	O	■	O	K	O	N
10	A	V	E	N	■	D	R	S	■	I	■	I
11	F	A	C	I	L	I	G	■	O	S	T	■
12	O	L	O	T	■	S	I	E	S	T	O	J

Nova problemo

Kaŝitaj vortoj (proponitaj de J. Turbillon)

Retrovu la ĉi-subajn nomojn de mamuloj en la kadro. La vortoj povas esti skribitaj horizontale, vertikale, oblikve, de malsupre supren, de dekstre maldekstren, ktp... Vidu la ekzemplojn. La sama litero povas utili plurfoje.

La neuzitaj literoj donos al vi nomon de granda mamulo.

alk'	erinac'	leon'	ornitorink'
aprin'	fok'	link'	pork'
azen'	**glir'**	lutr'	rat'
balen'	ĝiraf'	lup'	sciur'
bov'	hund'	mamul'	tigrid'
bubal'	kamel'	**mel'**	**ur'**
cerv'	kanguru'	**mul'**	urs'
ĉam'	kat'	mus'	vespert'
ĉeval'	kunikl'	narval'	vulp'
dama'	lam'	otari'	zebr'

S	C	I	U	R	U	G	N	A	K	O	H
I	L	R	Ĉ	E	V	A	L	P	O	R	K
H	U	B	O	Ĝ	U	R	U	R	S	N	O
U	P	E	L	T	I	G	R	I	D	I	F
N	E	Ŝ	A	U	A	R	P	N	G	T	K
D	O	T	B	P	T	R	A	L	E	O	N
C	L	A	U	T	A	R	I	F	O	R	I
A	L	K	B	T	V	R	E	C	M	I	L
N	U	A	I	A	M	O	D	P	U	N	P
I	M	A	L	N	E	L	A	B	S	K	L
R	E	M	A	M	U	L	M	A	Ĉ	E	U
E	L	L	E	M	A	K	A	J	B	O	V


GRAMATIKO PER BONHUMORO

Aĉidento




Doktoro, ĉu vi ne havas martelon pli malgrandan ? Memoru : de kiam vi operaciis mia genuon, ĝi ne tre bone scias reĝi siajn movojn.

Ne ĉio estas perfekta



Jen la nura genaĵo de nia apartamento ; oni devas trairi la salono por eliri en la banĉambron.

Sinsekvo en la ideoj



Sinjorinoj kaj sinjoroj, ĉu vi volas tremi pro hororo ? Restu kun nin kaj rigardu tiu filmon, kiu estas la ripetado de nia informoj.

LA AKCENTO ŜANĜAS :

1) **la sonon de la konsonanto :**
(si-ŝi) (ci-ĉi) (j-ĵ) (g-ĝ)

2) **la sencon de la vorto :**

(jen bona jaro) (jen plena ĵaro) (gemo-ĝemo)

LA EKZAKTAN RADIKON oni kontrolas en vortaro :

NI komparu : (krano-kranio) (porto-pordo) (ciklo-ĉiklo) (centaŭro-centaŭreo) krambo-kramfo-krampo)

ĈU estas demanda vorto :

ĉu niaj amikoj venos ?

CERBUMU !

Ĉiu teksto, sub la bildoj, entenas **tri erarojn.** La korektoj estos en la venonta numero de « Kulturaj Kajeroj ». Sed v.ajn proprajn korektojn vi povas sendi al S-ino Guillot, 5, rue René Blanc, 74100 Annemasse (Francio).

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (975 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1982, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le compte rendu de la dernière réunion du Conseil d'administration vous donnera un certain nombre d'éclaircissements sur les sujets qui ont été débattus et sur les décisions prises. Les dépenses entraînées par le branchement du service d'eau seront couvertes par un emprunt sans intérêt. Déjà, à la suite de la parution du dernier « Entre Nous », des envois d'argent et des propositions de prêt nous avaient été faites. Je pense que la somme nécessaire sera atteinte *. Sur le plan financier, il nous faudra aussi penser à la quatrième édition de « Por la Praktikantoj ». Je sais que la générosité spontanée de nos amis qui s'est déjà manifestée se prolongera et nous enlèvera tout souci concernant ces financements. Cette générosité s'est également concrétisée par des dons destinés à l'achat d'arbres. Nous remercions tous les amis qui nous permettent de planter quelques pruniers et poiriers pour le jardin, des arbres à feuillage coloré et des arbustes fleurissant l'été pour les pelouses. Nous espérons que le choix qui a été fait apportera une touche supplémentaire au cadre du château qui plaira à tous et en particulier à ceux qui ont rendu possible cette amélioration.

Le calendrier et la durée des stages ont été un peu modifiés par rapport à ceux de l'an dernier. La répartition en quatre périodes de deux semaines a été appréciée d'un certain nombre de participants, sauf de ceux, et ils sont assez nombreux qui, de Grésillon, auraient aimé (ou avaient l'habitude) aller directement aux Congrès de U.E.A. ou de S.A.T. L'écart entre la fin du premier stage et le début des congrès était trop grand. Ceci explique, du moins en partie, que la première période ait rencontré un succès bien moindre que les années précédentes. Pour 1983, nous avons donc décidé de conserver le système des périodes de deux semaines, sauf pour le premier stage qui durera trois semaines et se terminera par « Esperanto Rendevuo », organisé par L.F. Koop. La deuxième période sera consacrée à des cours de trois niveaux. La troisième verra la priorité donnée aux travaux manuels qui seront plus nombreux et dirigés uniquement en espéranto, ce qui permettra aux participants de tester leur niveau de langue parlée et de progresser. Un cours d'espéranto sera proposé pour aider ceux qui rencontreraient des difficultés, en particulier dans le domaine de la langue artisanale. Des visites d'artisans régionaux sont prévues. Enfin, à la demande de F.U.B.E., une période de deux semaines sera consacrée à une rencontre d'espérantistes non-voyants, mais il est bien entendu que cette période, de cours et de conférences, sera également ouverte aux voyants.

Nous espérons que le programme de l'an prochain plaira comme ont plu ceux des années précédentes. Avant même qu'il ait été imprimé, les demandes de renseignements arrivaient. Nous comptons sur vous tous et sur vos amis pour que l'année 1983 soit elle aussi un succès.

P. BABIN.

* Elle est atteinte au 15 décembre 1982.

INTER NI

En sia lasta kunveno nia estraro oficiale decidis pruntepreni monon por la modernigo de la akvosistemo. Jam antaŭ tiu decido pluraj geamikoj sendis al ni sumojn kaj ni estas certaj, ke venos sufiĉe da monpruntoj aŭ donacoj por kovri almenaŭ grandan parton de la elspezoj. Ni devos pensi ankaŭ pri la kvara eldono de la lernolibro, Por la Praktikantoj, kiu baldaŭ elĉerpiĝos.

La sumoj senditaj por la plantado de arboj tre baldaŭ estos utiligitaj por aĉetado de fruktarboj, ruĝfoliaj arboj por la parko kaj arbetoj, kiuj ĝojigos la kastelan ĉirkaŭaĵon per belaj koloroj. Ni multe dankas la donacintojn.

La daŭro kaj kalendaro de niaj venontjaraj studperiodoj ne estas tute similaj je la ĉijaraj. Por plaĉi al pluraj geamikoj kiuj tiel povos ĉeesti la unuan grezijonan periodon kaj poste viziti unu el la universalaj Kongresoj, la unua staĝo estos trisemajna. Post ĝi okazos la Esperanto-Rendevuo organizita de L.F. Kooperativo kun Giorgio Silfert kaj Perla Martinelli.

La dua periodo estos dusemajna kaj, kiel kutime, dediĉita al kursoj por diverslingva ĉeestantaro. Dum la tria periodo la artmetioj instruitaj estos pli multaj ol kutime. Ĉiuj kursoj estos gvidataj nur en Esperanto, kio permesos al la lernantoj testi sian lingvonivelon kaj progresi. Esperanto-kurso helpos tiujn kiuj renkontos malfacilaĵojn. La lasta periodo estos organizita de la Franca Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj. La kursoj kaj prelegoj estos malfermitaj ankaŭ al la vidpovaj gesamideanoj.

Ni esperas, ke tiu programo plaĉos al ĉiuj. Jam alvenis multaj informpetoj. Ne tro atendu. Petu nian programon.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de M. Joseph Kraemer. Il était un fidèle de Grésillon où il aimait faire partager son amour et sa connaissance de la nature aux participants. Nous présentons à sa famille nos sincères condoléances.

Le prix de l'abonnement
à « **Kulturaj Kajeroj** »
est modifié
à partir du 1er janvier 1983
et passe à **60 francs** par an

Pour vos vœux de fin d'année
La Maison Culturelle a pensé à vous
Commandez à notre Libro-Servo :
LA TRES BELLE CARTE DE VŒUX REPRESENTANT LE CHATEAU
★
PRIX : **3 francs l'unité**
+ frais d'envoi
24 francs les 10

Pour vos lectures
et vos cadeaux de fin d'année
offrez un chef-d'œuvre
de la littérature française
magistralement traduit
NORMANDAJ RAKONTOJ
de **Guy de Maupassant**
Traduit par Roland DUPUIS
Illustré par R. PINCHON
★
Prix : 36 francs
— **Rabais à partir de 3 exemplaires** —

Conseil d'Administration du Dimanche 24 Octobre 1982

La séance est ouverte à 10 heures par le président.

Présents : MM. et Mmes P. Babin, Bénistant, Boyet F., Boyet H., Dairon, Guillot, Mathé, Métivier, Micard, Vincent.

Excusés : MM. et Mmes D. Babin, Bodereau, Chevalier, Cheverry, Lemagadure, Lloancy, Prévot.

STAGES DE L'ETE 1982

Premier stage

Responsables : P. et L. Babin. Conférences et représentations théâtrales.

Etude de la langue dans le cadre de conversations animées par M. F. Boyet.

Certains participants ont regretté que ce stage ne dure que deux semaines.

Deuxième stage

Responsables : P. Babin et D. Babin.

— Premier cours assuré par Mme Childs-Mee.

— Deuxième cours assuré par M. Parisot.

— Troisième cours sous forme d'atelier de lecture, animé par M. Mollison.

Troisième stage

Responsables : Mme Lenel et Mme Vincent.

— Seminario dirigé par Mme Childs-Mee.

— Cours pour débutants assuré par M. Mee.

— Deuxième cours dirigé par M. Lloancy.

Quatrième stage

Responsables : J. et J.-P. Guillot.

Stage réservé aux activités manuelles, avec, cette année, des activités nouvelles : céramique, patchwork, cartonnage. M. F. Boyet a animé un groupe d'étude de la langue par la lecture d'un livre.

Esperanto-Rendevuo

Organisé par L.-F. Koop. Groupes de travail dirigés par S. Bourot, P. Martinelli, G. Silfer.

BILAN FINANCIER

Recettes

Les recettes de séjours sont en légère diminution (— 1,86 %). Les inscriptions sont en augmentation de 13 %, la librairie de 12 % et les souvenirs de 26,5 %. Par contre, les recettes de la caisse « tickets » sont en diminution de 20 %.

Dépenses

Les dépenses d'alimentation ont diminué de 1,88 %, alors que les salaires ont augmenté de 6,72 % et les charges de 5,56 %.

STATISTIQUES

On observe une légère diminution de la fréquentation de la M.C.E. On a enregistré 3.712 nuités contre 4.353 en 1981 (— 17 %). La période la plus fréquentée a été, cette année, la troisième.

On note qu'un grand nombre de personnes sont venus à Grésillon cette année : 330 au lieu de 317 en 1981, mais la moyenne de séjour a été plus faible (11,3 jours en 1982 au lieu de 13,8 en 1981).

La moyenne d'âge des participants n'a pratiquement pas varié depuis l'année dernière.

STAGES 1983

Printemps : du 3 au 9 avril.

Rencontre d'enfants.

Premier stage : du 2 au 22 juillet.

Conférences et cours.

J. Turbillon assurera un cours pour débutants.

Parmi les conférences, certaines seront axées sur le thème choisi par l'O.N.U. pour 1983 : « La communication ». MM. Boyet F., Métivier et Röllinger ont accepté d'assurer une conférence.

Esperanto-Rendevuo : du 22 au 24 juillet.

Organisé par L.-F. Koop. Groupes de travail de différents niveaux dirigés par S. Bourot, P. Martinelli, G. Silfer.

Deuxième stage : du 25 juillet au 7 août.

Cours de trois niveaux :

— Premier degré assuré par Mme Childs-Mee.

— Deuxième degré assuré par M. Lloancy.

— Troisième degré assuré par M. P. Babin.

Troisième stage : du 8 au 21 août.

Artisanat et Esperanto.

Activités manuelles dirigées par W. Grela (photo), N. Bellorget (patchwork), S. Alexandre (cartonnage), S. Sire (céramique).

TARIFS

Les tarifs pour 1983 sont fixés comme suit :

Droit d'inscription : 50 F. jusqu'à une semaine, 100 F. pour deux ou trois semaines.

	7 jours ou plus	moins de 7 jours
Chambre 1 personne	100	120
Chambre familiale (2 à 5 personnes)	83	100
Chambre commune	72	88
Campeurs	66	77
Enfants (3 à 6 ans)	45	50
Enfants (1 à 3 ans)	30	35

TRAVAUX

— Un devis a été établi pour la réalisation du branchement d'eau au service communal. Il s'élève à 38.406,23 francs. Un emprunt a été lancé pour couvrir cette dépense. Il sera remboursable par tiers en décembre 1983, 1984, 1985. Il est sans intérêt.

— Il sera nécessaire d'améliorer la salle de vannerie et de réaliser une aération dans la salle de reliure.

— Des aménagements de l'installation électrique du laboratoire de photo permettront d'améliorer la stabilité de l'alimentation.

— L'escalier du « logement Babin » menace de s'effondrer. Il faudra le réparer. Une corde-main courante sera installée dans l'escalier du deuxième étage afin d'en faciliter l'usage.

— Les peintures et tapisseries des chambres de l' « inter-étage » seront rénovées.

— Une souscription a été ouverte pour acheter des arbres à fleurs et à fruits. Les achats se feront prochainement en choisissant les essences les mieux adaptées au climat et au terrain.

QUESTIONS DIVERSES

— Tarif de l'abonnement à « Kulturaj Kajeroj » : il est fixé à 60 F.

— Les tarifs des cours par correspondance sont également modifiés : premier degré, 100 F. ; deuxième degré, 100 F. ; troisième degré, 70 F.

— Il serait souhaitable qu'une lampe soit installée au-dessus de l'entrée du château.

— Il a été demandé d'éditer une brochure sur les excursions possibles à partir de Grésillon.

— Les stages de la M.C.E. semblent pouvoir entrer dans le cadre de la formation continue. Cela devrait permettre à certains de participer aux activités avec des facilités financières.

— Le manuel « Por la Praktikantoj » risque d'être bientôt épuisé. Une nouvelle édition est envisagée.

— U.E.A. propose d'imprimer « Kulturaj Kajeroj ». Des renseignements seront pris pour connaître les tarifs et les conditions.

Le secrétaire de séance : J.-P. GUILLOT.

LIBRO--SERVO

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Adressez vos commandes à :

Janine VINCENT
B.P. 54
49150 BAUGE

Intitulé pour les chèques :
Maison Culturelle Esperantiste
C.C.P. : 1 485 39 P NANTES

Port gratuit pour commande au-dessus de 100 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entrainenement à un cours supérieur : versions thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 70,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà. ★

Régler les cours par un chèque à part

Les extraits de notre catalogue

En 1961 a paru la traduction en françaisdu livre

PRINTEMPO en la AŬTUNO
de Julio Baghy

Les exemplaires restants ont été mis à notre disposition par la traductrice Irène Marsy.

Prix de l'exemplaire : **15 francs**

Les sommes recueillies serviront à abonner à « Kulturaj Kajeroj » des espérantistes du Tiers-Monde.